PANORAMO-INFO

Sciiga letero por la Esperantistaro en Saksio-Anhaltio

14-a jarkolekto 2005-1

Ne forgesu:
21-an de majo 2005
migrado al Domholzschänke.
ni renkontiĝos 10:00h ĉe la urbodomo de Schkeuditz

Denove Esperanto-kurso en Halle

Jam pasis kelkaj jaroj post la okazo de Esperanto-Kurso en Halle. La nova kurso estos 22an kaj 23an de julio 2005 en Eine-Welt-Haus en Halle. Kristjan (Christian Schmidt) kolektis sufiĉe multajn lernemulojn – jam estas tiom multaj ke ni planas okazigi duan kurson kelkajn semajnojn poste. Se vi mem interesiĝas pri partopreno en Esperanto-kurso aŭ konas iun alian interesiĝanton, ne hezitu demandu nin pri sekva kurso. Pliajn informojn vi trovas sur nia retpaĝo *http://www.esperanto-halle.de*

jogo

Reta diskutgrupo/forumo pri Esperanto en Saksio-Anhaltio

Jam ekde la pasinta jaro ekzistas reta diskutgrupo/forumo pri Esperanto en Saksio-Anhaltio en *yahoogroups.de* la nomo de la grupo estas esperanto-anhalt. Respondecas pri la forumo Jörg Gersonde. Intertempe jam 21 membroj estas en ĝi. Informoj kaj demandoj venas el la lokaj grupoj Magdeburgo kaj Halle kaj el la najbaraj federaj landoj.

jogo

Recenzo pri magistriĝa verko

En Panoramo-Info 2004-4 ni raportis pri la sukcesa magistriĝa verko de Julia Treder pri la historio de Esperanto en Halle. Intertempe aperis recenzo de d-ro Mattusch pri tiu verko en *Esperanto aktuell 2/05*. D-ro Mattusch estis membro de la Esperanto-grupo Halle. Li estas aŭtoro de porstudenta lernmaterialo kaj verkis ankaŭ la tre legindan libron *Esperanto – ein Ausweg aus Babylon? 95 Jahre Esperanto in Düsseldorf* (Esperanto – ĉu vojo el Babilono? 95 jaroj Esperanto en Düsseldorf)

jogo

21a PSI en Mücke (en meza Heslando)

De 21a ĝis 28a de marto 2005 okazis 21a Printempa Semajno Internacia. Ĉeestis 110 personoj el 10 landoj kiuj ĝuis la jam tradician skemon de la aranĝo: antaŭtagmezaj prelegoj, posttagmezaj ekskursoj kaj vespera kultura programo. Christoph Frank prezentis pupteatraĵon kaj aranĝis fabelan feston ne nur por la infanoj.
Plej elstara kulmino estis la komuna koncerto de Kim kaj Jomo.
La ekskursoj estis ege variaj: sur bieno de familio Diehl ni rajtis produkti fromaĝon, la cerbo ricevis sian nutraĵon en Mathematikum en Giessen kaj Infana Akademio en Fulda. Sed ankaŭ minejo, bierfarejo, ĉokolada muzeo, muzeo pri fajrobrigadoj kaj la belaj urboj Grünberg kaj Wetzlar allogis multajn ekskursantojn.Televida teamo vizitis la aranĝon kaj produktis tre pozitivan elsendon, kiu estis spektebla dum la novaĵoj el tiu federa lando.
Mi jam antaŭĝojas sekvan PSI, kiu okazos en St. Andreasberg en la montaro Harz. Espereble tiam ne estos problemoj ricevi vizon por Esperantistoj el Rusio kaj Armenio.

jogo

Kim, Thomas kaj Jomo

faktraba domo en Grünberg

konstruado de ponto en Mathematikum en Giessen

Esperanto-Ligo Saksio-Anhaltio

La 30an de aprilo okazis la jarĉefkunveno de la Esperanto-Ligo Saksio-Anhaltio en Bernburg. Estis elektitaj kiel estraro Hermut Rieche (prezidanto), Jörg Gersonde (vicprezidanto), Klaus König (trezoristo). Revizisto estas Albrecht Bucholski. La estraro kaj la lokaj grupoj raportis pri siaj agadoj. Gerhard Hirschmann transdonis salutvortojn de la landa sekcio de Mondcivitanoj. La kunveno reciprokis la saluton.
Post la oficiala parto ni uzis la okazon viziti la mezepokeskan feston sur la korto de la kastelo. Eblis grimpi la turon de Eulenspiegel kaj viziti la muzeon pri torturiloj laŭ rabatita prezo.

jogo

Eulenspiegel en la turo de la kastelo Bernburg

Germana Esperanto-Kongreso en Bad König

La 82a Germana Esperanto-Kongreso okazis de 5a ĝis 8a de majo 2005 en Bad König. Ĉifoje estis elektoj, novaj estraranoj estas Peter Hauge el Nürnberg, kiu anstataŭos s-ron Reinhard Pflüger, kaj d-ro Rudolf Fischer.
La kongreso estis ege bone organizita – estis altnivelaj prelegoj de P. Chrdle, G. Handzlik, profesoro R. Selten, A. Korĵenko kaj aliaj. La komunaj manĝoj donis eblojn por konatiĝi kaj paroli kun la aliaj partoprenantoj de la kongreso. Ankaŭ la ekskurso tra Odenwald (Odinarbaro) kun urbogvidado tra Erbach kaj vizito de la muzeo pri eburo estis tre impresigaj. Bedaŭrinde la vetero ne vicigis sin en la aron de bonaĵoj; sufiĉe ofte pluvis kaj nur per bonŝanco ni povis kapti sekan momenton por fari komunan foton.
Post la jubilea kongreso 2006 en Brunsviko la 84a GEK gastos 2007 en Hamburgo.

jogo

skulptaĵo en la ebura muzeo en Erbach

Vivo, plena de batalo por justeco

Je la unua tago de la nuna jaro 2005 okazis la 350a datreveno de la naskiĝtago de **Christian Thomasius** (pron. Kristjan Tomasius), 1655 - 1728.

Li vestis sin laŭmode, sed sub la alta baroka peruko troviĝis unu el la plej progresemaj homoj de la tiama tempo. Oni nomas lin: unu de la patroj de la germana epoko de la raciismo.
Li naskiĝis kiel filo de lepsika familio de eruditoj. Li studis juron en la universitatoj Lepsiko kaj Frankfurto/Odro. Thomasius doktoriĝis en la jaro 1679. Post kleriga vojaĝo tra Nederlando li laboris dum mallonga tempo kiel advokato en sia naskiĝurbo. Baldaŭ li komencis labori kiel privata docento. En la jaro 1687 li same kiel antaŭ li Martin Luther uzis afiŝojn por publikigi. Li fiksis afiŝojn sur 14 lepskajn pordojn, per kiuj li informis per germana lingvo, ke okazos privata prelego en germana lingvo.

bruligo de sorĉistino en la 16a jarcento, anonima pentraĵo ĉ. 1860

el Die Chronik der Weltgeschichte 4.0 SE

Tio estis kiel provoko kontraŭ la kleriga monopolo de la latina. La registaro de la tiama lando Kursachsen (Kursaksio) malpermesis al Christian Thomasius plue prelegi. Pro tio li venis al Halle. En Halle li apartenis al la kunfondintoj de la universitato de nia urbo. La fondiĝo de la universitato okazis en la jaro 1694, sed jam ekde la jaro 1691 Thomasius estis profesoro en Halle. Dum la tempo de Thomasius la universitato Halle fariĝis tre fama instruejo. Tiatempe oni nomis ĝin la „unua moderna universitato“.
Christian Thomasius batalis kontraŭ la procesoj kontraŭ sorĉistinoj, por la forigo de la torturoj ĉe la serĉado de la juro kaj li ankaŭ postulis pli mildajn punojn anstataŭ la tiamaj kutimaj, ofte kruelaj, punoj. En sia filozofio li metis la moralon super la leĝon. Pri la leĝo li asertis ke ekster la socio ĝi ne ekzistas. Dum la tuta vivo li batalis por justeco, vero kaj toleremo por alipensantoj. Li malfavoris aŭtoritatan fidon.
Ekde 1710 Thomasius estis rektoro de la universitato Halle. Li estis la unua, kiu instruis per la germana lingvo. En la jaro 1728 li mortis kaj nun li ripozas en paco sur la tombejo „Stadtgottesacker“ (urba dia kampo) en Halle.

ugg

Panoramo-Info en formato PDF

Jam ekde la pasinta jaro tuj post pretigo de la papera versio de Panoramo-Info haveblas dosiero en la formato PDF *(portable document format, portebla dokumenta formato)*, kiu estas legebla sur ĉiu komputilo per senkosta programo. Ni produktas du PDF-dosierojn, unu kun la plej bona kvalito de la bildoj (tiu dosiero estas iom pli granda) kaj alian en kiu la bildoj ne havas la plenan kvaliton (ĝi estas pli malgranda). Posedantoj de analogteknika modemo certe spertos la diferencon laŭ la bezonata tempo por preni la dosieron. Avantaĝo de la PDF-dosieroj estas ke la bildoj estas koloraj
http:www.esperanto-halle.de

jogo

Katharina von Bora

Katharina von Bora naskiĝis je la 29.01.1499 en Lippendorf kiel filino de la saksa malriĉa familio de aristokratio. Katharina havis 10-jarojn, kiam la patro donis ŝin al monakinejo. En la jaro 1523 ŝi fuĝis al Wittenberg (pron. Vitenberg) per helpo de Martin Luther. Katharina von Bora kaj Martin Luther geedziĝis 1525. Ŝi zorgis pri la mastrumado de la familio. Per 3 filoj kaj 3 filinoj la familio pligrandiĝis. Post la morto de Martin Luther ŝi devis fuĝi plufoje el Wittenberg. En la jaro 1552 ŝi fuĝis pro la malsano pesto al la urbo Torgau. Dum tiu fuĝo la ĉevaloj subite ektimis kaj Katharina falis surteren kaj vundis sin tiel malbone, ke ŝi mortis la 20an de decembro 1552.
Ĉiujare en junio oni memorigas en Wittenberg per la urba festo “La geedziĝo de Luther” pri la fuĝo de Katharina von Bora el la monakinejo.

Luther kaj lia edzino Katharina von Bora
duobla portreto de Lucas Chranach d.Ä. (la pli aĝa), 1529

ugg *el* Die Chronik der Weltgeschichte 4.0 SE

Preskaŭ trafo

Kruko vizitas la okcidentan parton de Usono, kaj aviadile superflugas Arizonon. Estas sennnuba, sunbrila tago, kaj la piloto komentas la pejzaĝon. "Je la dekstra flanko," diras la piloto, "vi povas vidi imponan Meteor-Krateron, kiu estas gravega turismaĵo en norda Arizono. Ĝi formiĝis kiam asteroido el nikelo kaj fero, proksimume 50 metrojn diametra kaj 150.000 tunojn peza, frapis la grundon je ĉirkaŭ 100.000 kilometroj hore. Tio disĵetegis brulvarmegan materion ĉiudirekten. La rezulta truo mezuras preskaŭ unu kilometron kaj duonan, kaj profundas 20 metrojn."
Kruko miregas pro tiu fenomeno. "Kaj vidu!" li ekscitas. "Nekredeble, sed ĝi preskaŭ trafis la ŝoseon!"

el la jahugrupo [E-anekdotoj]

Pripensinde ...

Kruko legas sciencan artikolon en gazeto. "Vidu," li diras al Baniko, "Ĉi tie oni skribas ke ni homoj utiligas nur 10% de nia cerbo."
"Ho," respondas Baniko, "imagu la potencialon kiun ni povus atingi se ni utiligus ankaŭ la aliajn 85%!"

el la jahugrupo [E-anekdotoj]

regulaj renkontiĝoj

Eo-grupo PANORAMO - Halle:
1-a mardo, 18.ooh: E.-Abderhalden-Str. 20
3-a mardo, 18.ooh: Bölbergasse
(restoracio "Zum Schwarzbrenner")
4-a mardo, 17.ooh: PIKo, informu vin

Eo-Gruppe Magdeburg:
ĉiu 2a mardo (ne en julio, aŭgusto),
Steubenallee 2

Eo-Klubo "Karapaco"
Zeitz: Dirk Bindmann, ✆+🖷 03441-273251
walden@t-online.de
Altenburg: kaiser-altenburg@t-online.de
✆ 03447-4012

eventoj

pliaj:
http://aliaflanko.de/kalendaro/
http://www.eventoj.hu

21.05.2005 **Schkeuditz**
promenado tra Domholz, **E-grupo Halle**
10:00 ĉe la urbodomo de Schkeuditz

21.-25.05.2005 **Herzberg**
Bibliaj tagoj. **Esperanto-Centro Herzberg**

18.06.2005 **Dresden**
E-grupo Halle ekskursas
al Saksa Esperanto-Biblioteko kaj
Marie-Hankel-Zentrum

25.06.2005 **Schwerin**
100 Jahre Esperanto in Mecklenburg-
Vorpommern. rok.ovo@t-online.de

22.-23.07.2005 **Halle**
Esperanto-Kurs, **E-grupo Halle**

17.09.2005 **Wörlitz**
REVO (Renkontiĝo Esperantista en VorlicO),
E-grupo Halle

22.10.2005 **Halle**
ANABEL (Aŭtuna Najbara Aranĝo kun Borso
de Esperanto-Literaturo), **E-grupo Halle**

adresoj

DEB - Deutscher Esperanto Bund
Immentalstraße 3, 79104 Freiburg,
✆ 0761-289299, Info 0180-esperanto (-3773726)
gea@esperanto.de http://www.esperanto.de

UEA - Universala Esperanto Asocio
Ĉefdelegito por Germanio:
d-ro Wolfgang Schwanzer,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
✆ 06136-46232, http://www.uea.org

SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda
Peranto por Germanio: Jiri Proskovec,
Heimbaustraße 10, 44143 Dortmund
proskovec@aol.com

ELSA - E-Ligo Saksio-Anhaltio
Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, ✆ 03496-558517
joerg.gersonde@esperanto.de

E-Grupo "PANORAMO" Halle
Siegfried Linke, Fischerstecherstr. 23,
06120 Halle, ✆+🖷 0345-5500348,
halle-saale@esperanto.de
http://www.esperanto-halle.de

E-Grupo Magdeburg
Edith Plümecke, Simonstraße 15,
39114 Magdeburg, ✆ 0391-8117421
DDungert@t-online.de
http://www.beepworld.de/
members75/esperanto-dungert

E-Grupo Leipzig
Werner Geidel, Karlsruher Str. 5 d
04209 Leipzig, ✆ 0341-4118577

Esperanto-Centro Herzberg
Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6,
37412 Herzberg, ✆+🖷 05521-5983
esperanto-zentrum@web.de
http://www.esperanto-zentrum.de

Literarurdienst "ESPERO"
Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18
27333 Schweringen, ✆+🖷 04257-983223
RoBo.ESPERO@t-online.de

PANORAMO-Info

Herausgegeben von der Esperanto-Gruppe „PANORAMO" Halle,
fina redaktoro: Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, 03496-558517, joerg.gersonde@esperanto.de
Bankverbindung: August Grosch, Kto.: 480 144 352,
BLZ 800 537 62, Stadt- und Saalkreissparkasse Halle